

Instruisto donas taskon...

Ni ĉiuj bone konu la Universalan Deklaracion pri Homaj Rajtoj.

Mi restas fidela je mia profesio kaj proponas al vi ĉiuj **taskon**. Tiu aktivaĵo devis esti parto de la Tago de la Lernado kadre de UK, sed tempo mankas, ILEI ricevis nur du horojn. Do tiu aktivaĵo povas tute bone okazi ekster tiu Tago.

Jen ĝi.

Bv iri al www.ilei.info kaj sur la ĉefpaĝo dekstre

vi trovos **la Universalan Deklaracion pri Homaj Rajtoj**. Bv elŝuti ĝin kaj atente legi ĝin. Ĝi entenas 30 artikolojn.

Poste mi petas vin starigi liston, kie aperos la tri plej gravaj artikoloj, kaj la tri malplej gravaj artikoloj.

	Numero
La plej grava artikolo de la tuta dokumento estas :	
La preskaŭ plej grava artikolo estas :	
La tria plej grava artikolo estas :	
...	
...	
...	
La tria malplej grava artikolo de la Deklaro :	
La preskaŭ plej malgrava artikolo de la Deklaro :	
La plej malgrava artikolo de la Deklaro :	

Do vi devas noti ses artikolojn entute.

Via respondo iru al la rilata paĝo de www.edukado.net -> Komunumo -> Forumo, bv tien meti vian decidon.

En atendo de via laboro

Elkore salutas

Mireille Grosjean

Prezidanto de ILEI